Dana Fervojisto estas organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)

Prezidanto:
Jan U. Niemann
Hovedvagtsstræde 9 E, 1
DK-3000 Helsingør
tel 49 26 13 19
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Karen K. Olsen
Manøvej 6
DK-4700 Næstved
tel 55 72 73 77
ĝiro 547-1044

Redaktantoj: Jan kaj Lene Niemann
Vidu adreson supre.

Reta hejmpaĝo de DEFA:
www.jernbaneesperanto.dk

Preso: HVS9E1

Redaktofino por venontaj numeroj de Dana Fervojisto:

1/6-2013
15/9-2013
1/11-2013

Enhavo:

paĝo 2 DEFA ĝeneral-kunveno 2013
paĝoj 3-6 Temo de la jaro
paĝoj 7-8 Aktivecoj
paĝoj 9-11 Nova fervojlini0o
paĝoj 12-14 La 65ª IFK
paĝo 15 Eventoj pri eventoj

Aranĝo najbarlanda
17 - 20. majo

90-a Germana Esperanto-Kongreso

– en Nürnberg, Germanio. Kongreso de GEA kaj festo okaze de la 125-a jubileo de la Nuernberga Esperanto-grupo. Inf.: Esperanto-Nürnberg (Sabine Hauge), Moritzbergstr. 37, DE-90482 Nürnberg, Germanio, esperantonord@googlemail.com

Dana Fervojisto 1

ISSN: 1397-9914

66a jareldono **Februaro 2013**

Ĉefa stacidomo en Bordeaux (Bordozo), kie IFEF kongresos en majo 2013..
Foto de la hejmpaĝaro de la kongreso, http://ifef-ufe-2013.over-blog.fr/

Voko al DEFA ĜENERALKUNVENO 2013
Diget 2, Køge
9/4-2013 je horo 19.00

Tagordo laŭ la leĝoj:

1. Elekto de vortgvidanto kaj protokolanto
2. Aprobo de la protokolo de pasintjara ĝeneralkunveno
3. Raportoj
   3a La prezidanto
   3b La kasisto
4. Venintaj proponoj
5. Kotizo
6. Elektoj:
   a) Prezidanto (por du jaroj)
      Sekretario (por du jaroj)
      IFEF-komitatano (por tri jaroj)
   b) Unu revizoro kaj unu anstataŭanto
7. Eventualaĵoj

ad. 4)
Proponoj, kiuj estu pritraktataj de la ĝenerala kunveno, devas esti en la manoj de la prezidanto plej malfrue la 4an de marto 2011.

Komuna manĝo okazos je horo 18.00. Mendu ĉe Karen, tel. 55 72 73 77.

Estu bonvena.

DEFA

Eventoj informas pri ... eventoj:

– Printempa Semajno

20 - 27. aprilo
3-a PRINTEMPAS – en Greziljono, Baugé, Francio. Intensaj kursoj en 3 niveloj kaj internaciaj KER-ekzamenoj B1, B2, C1. Inf.: Esperanto-kastelo Greziljono, Château de Grésillon, FR-49150 Saint Martin d'Arce, Francio. Rete: kastelo@gresillon.org

27. aprilo
38-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA – en Roterdamo, Nederlando. Inf.: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

4 - 11. majo
65-a Kongreso de IFEF kaj de UFE en Artigues apud Bordeaux, Francio. Temo: Rolo de la fervojoj en disvolviĝo de la moderna mondo. Inf.: AFCE, 9 rue de Château-Landon, Fr-75475 Paris (10), Francio. Rete: jeanripoche@wanadoo.fr

10 - 12. majo
Brita Kongreso 2013 – en Ramsgate, Britio. Laŭnome Brita Kongreso sed pro la proksimo de Ramsgate al La Kontinento, efektive 3-landa Markola kongreso. Gastoparolanto la kuratoro de Edukado.net, Katalin Kováts. Inf.: EAB, Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE, Britio. Rete: eab@esperanto.org.uk Tel: +44(0)1782 372141

10 - 12. majo
1-a printempa renkontiĝo – en Sarlando, Loreno kaj Luksemburgio - (esperante) vivi la 3-landan realon. Esperanto, kulturo, librobazaro, feriado. Inf: Teresa Liberska, Rete: drfjd@web.de

Pri la frontpaĝa foto:

la stacidomoj de Bordeaux

La stacidomo St.-Jean staras sur la maldekstra bordo de la rivero *Garonne* (Garono) kaj estas unu el origine tri stacidomoj en Bordozo. Hodiaŭ el tiuj tri nur tiu-ĉi funkcias.

La 'orleanan stacidomon' (sur la alia flanko) konstruigis la 'Kompanio de Parizo-Orleano' en la jaroj 1851-1853. Temas pri kapstacio konstruita de la arkitekto Darru laŭ nov-klasika arkitekturo-stilo. Ĉar ne estis ponto en la urbo, la homoj, kiuj vojaĝis de Parizo al suda Akvitanio devis eltrajniĝi en tiu stacidomo, transiri Garonon kaj reentrajniĝi en la 'Johano-stacidomo' - *Bordeaux-Saint-Jean* .

En 1860 la konstruado de ponto farita de Gustavo Eiffel kaj Paolo Regnauld ebligis ligi la du stacidomojn. Tamen la 'orleana stacidomo' daŭre estis kapstacio kaj posedaĵo de la 'Kompanio Parizo-Orleano' (*Compagnie du Paris-Orléans*), dum 'Kompanio de fervojoj de la sudo' (*Compagnie des chemins de fer du Midi*) posedis la 'Johano-stacidomon'.

En 1898 oni konstruis la novan (kaj nunan) *St.-Jean*-stacidomon por povi akcepti pli multaj pasaĝeroj. De tiam la 'orleana stacidomo' perdis sian signifon kaj ne same estis uzata kiel antaŭe.

En 1934 la du Kompanioj supre menciitaj unuiĝis, kaj en 1938 kreiĝis *SNCF*; ekde tiam oni tute ne plu uzis la 'orleanan stacidomon'. Poste oni uzis ĝin nur por vartransportoj, antaŭ ol definitive flankenlasi ĝin ĉ. 1980 – kaj la forlasita konstruaĵo disfalis en ruinojn.

En 1984 ĝi estis registrita kiel 'historian monumenton' pro la internaj dekoraĵoj, pro la fasadoj kaj pro la tegmento. Komence de la 21-a jarcento post renovigo ĝi trovis novan vivon – kiel kinejo kaj restoracioj.

Temo de la jaro

Ankaŭ por 2013 ni sukcesis decidi pri temo ... ni elektis SAMIDEANOJN. En Esperantio ni multe parolas pri samideanoj – ni ja ĉiuj estas – sed ni trovis kvar personojn ekster Esperantio, kiuj estas kun Zamenhof samtempuloj (proksimume) kaj samideanoj – en la senco, ke ili volis la pacon kaj ĉiu en sia maniero laboris pri tio. Do, antaŭĝoju konatiĝi kun kvar interesaj kaj por la mondo signifaj personoj.

Portreto de idealisto - *Albert Kahn*

Samtempulo kun d-ro Zamenhof kaj kun ne tro malsimilaj ideoj kaj vizioj *Albert Kahn* estas interesa persono.

Albert Kahn naskiĝis en 1860 en Alsacio, limregiono inter Germanio kaj Francio, kiu en tiu tempo estis franca. En 1871, post la 'franc-germana milito', Alsacio fariĝis germana, kaj la *Kahn*-familio decidis translokiĝi al Francio.

16-jaraĝa *Albert Kahn* venis al Parizo, kaj li montris grandan talenton por bank- kaj invest-komerco. Post nelonge li havis grandan sukceson, li fondis sian propran bankon, kaj li estis komence de la 20a jarcento unu el la plej riĉaj homoj en la mondo.

Jam en 1887 li skribis al amiko: *'Mia komerco bone iras, sed vi ja scias, ke ne estas mia idealo kaj mia celo ... '* – kaj poste li dediĉis sian vivon kaj sian monon al la espero pri tutmanda paco.

Li atakis tiun defion iom aliel ol d-ro *Zamenhof*. En la jaroj de 1898 ĝis 1931 li iniciatis, fondis kaj financis plurajn projektojn kaj instancojn, kiuj laboris por interkompreniĝo inter homoj. Ekzemple *'Autour du monde'*

('Tra la mondo') donacis monon al homoj, kiuj vojaĝis al diversaj landoj kaj mondopartoj.

Plej konata nuntempe *Albert Kahn* estas por sia *'Archive de la planète'* ('Arkivo de la planeto'), kiun li iniciatis en 1912. Li tre interesiĝis pri novaj teknikaj aferoj, kaj ĝuste komence de la jarcento oni povis fari filmojn kaj kolorbildojn.

Kahn estis piniro en tiu sfero, kompreneble parte ĉar li havis monon, ĉar fari kolorbildojn estis kosta afero – ĉiu nova afero estas kosta! Li (kaj liaj fotografoj) fotis kolore per la *'autochrome*-tekniko' kaj meze de la 1920-aj jaroj eĉ filmis kolore per la *'aditiva/3-lensa*-tekniko' kelkajn jarojn antaŭ komencis *Hollywood* labori per *Technicolor*.

Kahn sendis fotografojn dise en la mondon por fotografi kaj filmi homojn, lokojn kaj eventojn ... lia teorio estis, ke se ni pli bone konas unu la alian, ni pli bone komprenas unu la alian – same kiel pensis *Zamenhof*. *Kahn* volis kapti la diversajn popolojn kaj iliajn lingvojn, vestaĵojn kaj kutimojn, por ke oni pli bone komprenu kaj akceptu la diversecon de la mondo.

Ekzemplo de fotografaĵo per la *'autochrome*-tekniko'. La motivo estas de *Angkor Wat* en la *Siem Reap*-regiono, Kampuĉea. Fotisto nekonata. Fonto: Vikipedio.

Maragane

MariElen DEZER kun siaj kunmuzikantoj animas okcitanan balon. Ili ĉerpas de sia riĉa repertuaro el tradiciaj regionaj muziko kaj kantoj, kaj ili proponas al vi kundanci skotiŝojn, valsojn, rondelojn, cirklojn, ktp. Ne hezitu partopreni sur la improvizita dancejo!

En la grupo estas *Jean* (akordiono, tirharmoniko), *François* (bekflutoj, tirharmoniko), *MariElen* (vjelo, tirharmoniko, bekfluto, violono) kaj *Véronique* (kontrabaso kaj perkutiloj). *Chantal* ne muzikas, sed klarigas pri la dancoj. Maragane intervenos ankaŭ dum la posttagmezo kaj gvidos paŝojn de la dancoj.

(fonto por tiu artikolo kaj por la artikolo pri la stacidomoj p. 14: la hejmaĝo de la kongreso, http://ifef-ufe-2013.over-blog.fr/)

Pli da informoj pri la 65-a IFK ...

El la programo ni ĉerpis por la dimanĉo de la kongresa semajno:

Okcitana vespero : la bordozaj maskeronoj kaj Maragane

La bordozaj maskeronoj

Pli ol tri mil maskoj el ŝtono ornamas la fasadojn de la burĝaj hoteloj, kiuj plibeligis la urbon Bordozo dum la 18-a jarcento. *Marcelo REDULEZ* proponas al la kongresanoj specialan viziton de la urbo, dum kiu oni levu la rigardon al tiuj maskeronoj. Ili estas mirindaj vivantaj artaĵoj, kiuj animas la urbocentron. Dum promenado oni strecu la atenton: ili okulumas, ridetas aŭ montras la langon al vi! Sed ili ankaŭ povas paroli al oreloj, kiuj kapablas aŭdi ilian flustradon.

Ĝuste en tiuj jaroj, kiam la fotografoj de *Kahn* vojaĝis kaj laboris, okazis multaj kaj rapidaj ŝanĝoj en la mondo, kaj tiel li sukcesis dokumenti multajn aferojn, kiuj nun malaperis. Ekzemple liaj fotografoj estis sur la balkana duoninsulo aŭtune 1913, tuj antaŭ eksplodis la afero – komencis 'etna purigado' kun forpelo kaj persekuto de certaj popolgrupoj, kaj post nelonge la mondo 'kaptita' per la fotoaparatoj ne plu ekzistis. Ankaŭ la fotografoj de *Kahn* unike dokumentis la vivon de soldatoj kaj civilaj homoj dum la unua mondmilito.

Dum la tutmonda ekonomia krizo en 1929 la firmao de *Kahn* severe suferis, kaj en 1931 ĉesis ĉiuj liaj projektoj. Li mortis en 1940, sola kaj senmona. Antaŭ tio transprenis *'Department of Seine'* (la regiono ĉirkaŭ Parizo) la fotojn kaj filmojn (kaj ankaŭ kelkajn domojn, kiujn *Kahn* posedis). Ekde 1986 ekzistas *Albert Kahn*-muzeo en la domo, kie loĝis ĝis sia morto, en *Boulogne-Billancourt* ĉe Parizo.

Estas franca nacia muzeo, kaj ĉirkaŭ la domo estas kvar hektaroj da bela ĝardeno en diversaj stiloj, ĉar dum siaj multaj vojaĝoj *Kahn* trovis inspiron por la ĝardeno hejme.



Kahn ne ŝatis esti fotita, sed li volonte montris sian ĝardenon. Fonto: Vikipedio.

La muzeo havas ĉ. 72.000 fotojn kaj 183.000 m da filmo, kaj de la arkivo oni ekspozicias ĉiam partojn – ĝuste nun la ekspozicio temas pri *'La Mongolie entre deux ères. 1912-1913'* ('Mongolio inter du epokoj. 1912-1913.'

JUN/LEN

Ĉu vi partoprenis?

Jen afiŝo por la 11-a IFES, kiu okazis en iama Ĉeĥoslovakio. Eble kelkaj legantoj partoprenis ĝin? Almenaŭ multaj DEFA-anoj (inter ili mi) portas kun si memoraĵojn pri multaj gajaj IFES-oj – okazis entute 50!

(La bildon mi pruntil de IFEF/L. Lani)

LEN

oni uzas ĝin por fervojlinioj por grandrapidaj trajnoj. Kaj tiu nova linio inter Kopenhago kaj Roskilde estos la unua fervojlinio por grandrapidaj trajnoj en Danio ... oni veturos ĝis 250 km/h.

La 'fizika' laboro komenciĝos nur venontjare – ni sekvos la evoluon.

Finfine la VOJAĜKARTO ... en Danio.

Post multjara laboro kaj provperiodoj en diversaj partoj de la lando la VOJAĜKARTO (Rejsekortet) nun funkcias. Depost la komenco en 2009 pli ol 200.000 danoj aĉetis la karton, kaj en 2012 estis faritaj 9,4 mio. da vojaĝoj per ĝi.

Ekde la 20a de januaro fariĝis malpli koste vojaĝi per la VCojaĝkarto ekster la pinthoroj, kaj tio havas efikon ... ĉiutage proksimume mil personoj aĉetas karton.
Ekde januaro 2014 oni en la ĉefurba regiono kaj norda Jutlando ne plu povos uzi la konatajn tondkartojn, kaj supozeble tio donos multajn novajn Vojaĝkart-uzantojn.

Aŭtomato por validigi la Vojaĝkarton

aliaj grandaj bestoj. Oni ja ne povas 'rakonti' al la bestoj, ke nun oni faris ion por certigi al ili sekuran iradon, sed la sperto estas, ke bestoj ege rapide eltrovas kaj amase uzas la instalaĵojn ... eble la bestoj parolas inter si Esperanton?

La pasejo povas konsisti el:

- ŝtuparoj en riveroj kaj riveretoj por fiŝoj
- betonaj tuboj sub aŭtovojoj (por i.a. vulpoj kaj meloj)
- ponto super ne-kultivsata tereno (por cervoj)
- ponto kun minimuma larĝeco 12 metroj, kie oni 'gvidas naturon' trans aŭtovojo, kanalo aŭ fervojo (en Danio por ruĝaj cervoj, - entute por grandaj bestoj)

Jen bildo de betona tubo sub vojo. Fonto: Vikipedio.

Tri danaj entreprenoj kunlaboras en konsorcio por kapabli preni sur sin la taskon, kaj la sumo por la laboro fafarota estas ĉ. 18 mio. da EUR.

La kontrakto estas 'desajn- kaj konstru-kontrakto' ... t.e., ke la konsorcio devas prizorgi la tutan projekton de la komenco ĝis la fino. Tio donas la eblecon al la entreprenoj trovi novajn kaj kreivajn solvojn de la labora proceso. Tiu konsorcio prezentas en tiu projekto novajn manierojn konstrui apogaj muroj – almenaŭ nova por Danio. La metodon oni ĝis nun neniam uzis en Danio. Oni povas per ĝi ŝpari tempon kaj monon, ĉar oni por la nova fervojlinio uzos jam faritajn betonelementojn anstataŭ fandi novajn surloke.

La teknikon oni bone konas en i.a. Francio, Japanio kaj Hispanio, kie

Aktivecoj de DEFA

La DEFA-kunvenoj okazas dum la vintra sezono alterne en la hejmoj de diversaj membroj, kutime en Køge kaj Næstved.

Por tiu sezono DEFA ne havas saman pezan taskon kiel pasintjare. La ĉefa fakprelego de la 64a IFK estas jam 'pasinteco' – sed kompreneble ni estonte sekvos la evoluon de la projekto, tiel ke ni bone povu informi al niaj kolegoj.

LKK de la 65a IFK lanĉis kongresan temon: **'Rolo de la fervojoj en la disvolviĝo de la moderna mondo'**, kaj petas al la landaj asocioj prezenti prelegetojn fakajn, kiuj tuŝas tiun temon. Do, por la vintro jam estas grava tasko decidi pri temo, verki tekston kaj prepari la prezenton. Cetere, por IF kaj DF ĉiam estas bonvenaj fakaj artikoloj, do viaj agoj en tiu direkto estas bonvenaj.

Ni havas la sekvajn datojn jam deciditajn:

En marto ni renkontiĝos ĉe Karen en Næstved, Manøvej 6, la 6an. Ni komune manĝos je la 18-a horo, - turnu vin ak Karen por aliĝi al tio. Tel. 55 72 73 77. La kunveno komenciĝos je la 19-a horo – ni diskutos la danan preleg-kontribuon por la faka prelegsesio dum la IFK en Bordozo en majo.

La DEFA ĝeneralkunveno de 2013 okazos la 9-an de aprilo. Vidu la alvokon paĝo 2.

.... cetere, turnu vin al la prezidanto por informj pri tempo kaj loko.

Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

Kopenhago

Kunvenoj de KEK (prezidanto: Betty Chatterjee, tel 38 89 10 13, retadreso kek@esperanto.dk) okazas en Kulturhuset, Toms-gårdsvej 35, 2400 Kbh NV. Vidu ankaŭ www.esperanto.dk

Århus

***Kontaktulo pri DEFA*:** La prezidanto.
Kunvenoj okazas kunlabore kun la Esperantoklubo de Århus en Seniorcentret, Østergade 30, dua etaĝo je h 19.30, la lastan ĵaŭdon de la monato.

Ĉefa Stacidomo

Piedfrapado de mil kruroj
sur poluritaj ŝtuparoj
eltiritaj soifaj radikoj
serĉas la teron
inter la betonaj blokoj
sub sulkigita frunto de l' oldulo
lacaj okuloj
fulma penso pri suda suno
la penso estiĝaskKaj timeme forkuras
Bosporo kie la maro bolas
estas malproksima
mi petas bileton
por iro al Rinkeby

Vortklarigoj: Bosporo = markolo de Konstantinopolo (Istambulo), Turkio.
Rinkeby = sveda urbeto.
La poeto vivis en Svedio.
Kroata litero š: elparolo ŝ

Tone Jakše, el la kroata tradukis Zora Heide

Fervoja novaĵo de Danio

En la periodo 2012-2018 oni konstruas novan du-trakan, elektrizitan fervojlinion de Kopenhago al Ringsted tra Køge. Sur ĝi oni povas veturi per rapideco ĝis 250 km/h – ĝi estos la unua de sia speco (por rapidtrajnoj) en Danio.

Maldekstre Kopenhago-Ringsted sur Selando (lej sude oni povas vidi la estontan situon de la nova Balmara Interligo, el kiu la nova fervojlinio estas grava parto), kaj dekstre pli detala bildo de la itinero. Fonto: Banedanmark.

La nuna fervojo de Kopenhago al Ringsted tra Roskilde estas 'plene eluzita' rilate al pasaĝeroj kaj laŭhoraraj trajnoj, kaj per konstruo de la nova itinero oni povos transporti pli da pasaĝeroj, veturi per pli da trajnoj kaj sperti malpli da malfruiĝoj.

Kompreneble ne nur por la lokaj naveduloj tio havos signifon – la fervojlinio estas parto de la reto inter Skandinavio kaj la cetera Eŭropo.

Antaŭnelonge (en januaro) oni faris kontrakton pri parto de tiu granda konstrulaboro – nome pri entute 12 pontoj sur itinero de 5 km ĉe Greve … vojpontoj, fervojpontoj kaj besto-pasejo.

Besto-pasejo estas 'ARTEFARITA KORIDORO' por bestoj - povas esti ekz-e ŝtuparo por fiŝoj en rivero aŭ ponto trans aŭtoŝoseo por cervoj kaj